
## *Enigma ekvacio*

El la literoj de du vortoj formu trian naŭliteran. La unuaj literoj de tiuj vortoj klarigas, kion en fabelo estas esprimate per 12 fratoj.

1. ligna konstrumaterilo + ŝafprodukto = aktiva homo
2. reĝa seĝo + fizika granda = sciencisto okupanta pri steloj
3. helena duondiino + granda ŝtono = ilo por transformi sonojn
4. haltigi + neparolema aktoro = positiva sinteno
5. grajno de kampa planto + skribo por memori = gaso en la aero
6. montranta fortajn simptomojn + permeso en pasporto = gramatika kazo
7. koloro + tradicia rakonto = batinstrumento
8. malfort, moderata + narkotiga drogo = kvarjara spaco inter sporteventoj
9. turnirdanco + ilo por jungi bovojn = iama sudeŭropano

Solvo el la novembra S.F.




Kontaktu nin!

Gun.Eb@t-online.de

+49 3831 490003




# Stralsundaj frekvencoj


Per Esperanto por popolkompreniĝo

jaro 2005 januaro


**Ne decas, ke vi plendas ĉi:**
**Se reen do senpente**
**al fora jar' nun vidas vi,**
**pluiru diligente!**

laŭ Friedrich Wilhelm Weber

⌘

***Al ĉiuj amikoj bonan starton en la novan jaron 2005 kaj maksimalajn sukcesojn por viaj familioj kaj en la movado.***

# Tio estis la jaro 2004

- - La Antaŭpomeria E-grupo Stralsund kunvenis al regulaj renkontiĝoj 11 foje en la lasta jaro. Nur en junio estis tro multe da eventoj, pro kiuj ni devis rezigni.
- 6. 3. Estrarkunsido en Güstrow por prepari la GEA-kongreson.
- 28. - 31. 5. Germana Esperanto-Kongreso en Neubrandenburg
- 1. - 5. 6. Postkongresa ekskurso al Rügen kaj Hiddensee
- 15. -23.6. Ĉebalta Printempo en Mielno.
- 24. 7. — 6. 8. Universala Kongreso en Ĉinio
- 28. 8. Somera ĝardenfesto en Pragsdorf
- 15. — 17. 10. Marie-Hankel-honorigo en Dresden
- 19. - 21. 10. Vizito de Francoise Houncounou el Benino
- 30 —31. 10. Semajnfina seminario en Neubrandenburg
- 5. - 7. 11. Kunveno kun Barbara Pieczak , redaktotino de
Radio Polonia, en Neubrandenburg
- 4. 12. Zamenhof-festo en Rostock

# Ĉu vi iam provis aŭskulti la programon de Radio Polonia?

|Radio Polonia, la poreksterlanda programo de Pola Radio estas parto de la publika radio. La tasko estas informi pri eventoj en Pollando, pri la premisoj de la pola eksterlanda politico, peri informojn pri ekonomaj temoj. Radio Polonia liveras al la aŭskultantoj objektivajn kaj senpartiajn informojn pri Pollando kaj pri la Esperanto-movado.

Sendadoj okazas ĉiutage laŭ monda tempo:

| | | | |
|---|---|---|---|
| 9:30h - 9:59h | per satelito | | |
| 11:00h - 11:29h | per satelito | | |
| 16:00h - 16:29h | m<br>kHz 7285 7270 | 4118 | 41.26 |
| 19:00h - 19:29h | m<br>kHz 7285 | | 41:18 |
| 20:00h - 20:29h | per satelito | | |

Tamen pli bone estas akcepti la sendaĵojn unu tago poste per interreto, Oni mem povas decidi, kiam estu la plej favora tempo.

Jen la adresojn. www.radio.com.pl/polonia www.wrn.org/ondemand

Vi devas elekti sur la koncerna paĝo la lingvon Esperanto, poste la deziratan tagon kaj finfine vian aŭdilsistemon.

***Nia venonta kunveno: 12. 1. 05, 14:30 h Sandornweg 62 en Stralsund***